Premio Paul Gubbins por Nova Ĵurnalisma Talento

Okaze de la 40-jara ekzisto de Monato, kaj por memorigi sian forpasintan ĉefredaktoron Paul Gubbins, la revuo starigis la Premion Paul Gubbins por Nova Ĵurnalisma Talento. Ĉiujare, kaj tiel longe ke restos mono en la fonduso kreita pro tiu ĉi celo, estos aljuĝataj ĉefpremio de 250 eŭroj, dua kaj tria premioj de 100 eŭroj kaj sep senpagaj abonoj de Monato.

Povas partopreni ĉiu persono, kiu bone regas Esperanton kaj kiu ne verkis por Monato en la lastaj kvin jaroj.

Por partopreni la kandidatoj sendu tekston de minimume 500 kaj maksimume 2500 vortoj al nova_talento@monato.be

La temoj, inter kiuj la kandidatoj povas elekti, estas:

- La politiko, vivo, turismo aŭ historio de sia lando aŭ regiono
- Ekonomio
- Komputado
- Scienco
- Medio kaj ekologio
- Lingvo

La redaktoroj decidos, surbaze de la lingva kaj ĵurnalisma talentoj de la aŭtoroj, kiuj artikoloj partoprenantaj en la konkurso aperos en Monato.
El tiuj la ĵurio, konsistanta el redaktoroj de Monato kaj eksteruloj, elektos ĉiujare la dek plej bonajn kaj atribuos al ilia aŭtoro la premiojn.

La kompleta regularo de la konkurso aperas en https://www.monato.be/nova_talento.php